# GRAMATIKO PER BONHUMORO


« Se la adverbo devenas de verbo transira (kiu postulas akuzativon), tiam ankaŭ la adverbo-prepozicio konservas tiun saman econ kaj estas uzata kun la akuzativo ; se la adverbo anstataŭas vorton, kiu povas ligiĝi kun substantivo nur per ia prepozicio, tiam ankaŭ la adverbo akceptas post si tiun prepozicion ; se la adverbo estas vorto ne devena, sed originala, kiu per si mem havas la sencon de prepozicio, tiam ĝi ligiĝas kun la substantivo senpere.

Tamen en ĉiu duba okazo vi ne faros eraron, se vi post adverbo-prepozicio uzos la prepozicion « je » aŭ la akuzativon.

(L.L. Zamenhof. Lingvaj respondoj).




— Spite kelkaj malfacilaĵoj mi sukcesis ĝin fari !



— Kaŭze de tiu televido, la rostbovaĵo estos tro kuirita.



— Rilate vian am-deklaron, ĉu vi estas certa pri viaj sentoj, Joĉjo ?